

Kotizoj

La baza aliĝkotizo dependas de la landokategorio kaj la aliĝdato de la aliĝanto. Estas du landokategorioj:

- A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
- B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

Aliĝperiodo:	ĝis 31.03.2012		ĝis 30.06.2012		post 26.07.2012	
	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI(1)	50 €	30 €	60 €	35€	70 €	45 €
Ne-membro	65 €	40 €	75 €	45 €	90 €	55 €
Junulo(2), handik. (3)	25 €	15 €	30 €	20 €	35 €	25 €

- (1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2012;
- (2) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1980.
- (3) Handikapulo. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.

Aliĝkotizo por unu tago estas 25 € por A- kaj B-landoj. (Loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj servoj pagendas aparte, laŭ oferto kaj prezaro, kiuj aldoniĝos al ĉi tiuj informoj.)

Rabatitaj kotizoj por fruaj aliĝintoj, kiuj pagas ĝis 31 dec 2011: A – 40 EUR, B – 25 EUR.

Premiaj rabatoj: 10% por ĉiu deka aliĝinto, 50% por la 50-a kaj 100% por la centa.

Kondiĉoj pri pagoj kaj repagoj por la konferenco de ILEI

- La aliĝkotizo ne inkluzivas ajnan asekuron, loĝadon, manĝojn, ekskursojn kaj aliajn eventualajn aparte pagendajn aferojn, pri kiuj informoj, mendiloj kaj prezoj aperis en IPR 2012/1, en la retpaĝaro de ILEI (vidu La Duan Komunikon de la 45-a Konferenco) kaj tra aliaj komunikkanaloj.
- 50% de la aliĝkotizo kaj 80% de la sumo por mendoj estos repagitaj, se la aliĝinto malaliĝos pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio 2012. Malaliĝinte pro valida kaŭzo antaŭ la 1-a de julio 2012, la aliĝinto

rericevos 60% de la sumo por mendoj, sed ne la aliĝkotizon. Malaliĝinte pli poste, la aliĝinto ne ricevos ajnan repagon.

- Kaze de ne-okazigo de mendita servo (ekz. pro ne sufiĉa kvanto de aliĝantoj), la pagita sumo por la koncerna servo estos repagita.
- Konferencaneco estas transdonebla, sed necesas alpagi la diferencon depende de la lando kaj aliĝperiodo. ILEI ne repagas la diferencon kaze de transdono al aliĝanto en malpli kosta kategorio.

Citaĵo el la konferenca regularo:

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la ILEI-Konferenco.
7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de junio de la konferenca jaro.

Subtenu aliajn

Kiel kutime, ankaŭ ĉi-jare ni petas vin laŭeble subteni ne-pagipovajn kolegojn kaj la agadon de ILEI ĝenerale. Vi povos aldone al via aliĝo donaci al la *Koleghelpa Kaso* (per kiu ILEI membrigas ne-pagipovajn instruistojn), al la *Fonduso Dazzini* (subteno al ne-pagipovaj partoprenantoj de konferenco), al la konferenca kaso ktp. Legu pli: <http://ilei.info/dok/Kasoj%20de%20ILEI.pdf>